# *Librofoiro Internacia de Havano 2023 estas spaco anka? por esperanto-lingvo*




**Foto: arkivo RHC**

De la 9-a ?is 19-a de februaro kiel jam tradicias, okazas la internacia librofoiro de Havano, en la kastelo de San Karlo de la Kabano kaj anka? en la historia urbocentro, ?e la Placo de Armilo, en la koro de la malnova urbo.

Temas pri la 31-a eldono de tiu ?i granda festo de libroj kaj de kulturo ?enerale, ?ar ?i inkluzivas ne nur libroprezentojn, vendadon de paperaj kaj ciferecaj libroj kaj ekspozicioj, sed anka? okazas prelegoj pri la mondo de eldonado kaj literaturo.

La slogano de la librofoiro portas la idearon de la nacia apostolo José Martí, kiu skribis la jenon: legi estas kreski. ?i-jare la gastolando estas Kolombio, kiu alvenis kun tre grava delegacio prezidita de Francia

Márquez, vicprezidantino de tiu ?i sudamerika lando. Kun ?i venis artistoj, verkistoj, pentristoj kaj muzikistoj, kiuj prezentas la ri?an kulturon de Kolombio.

La librofoiron partoprenas eldonejoj  pli ol 40 landoj, kaj Kubo anka? prezentas vastan gamon de libroj pri diversaj fakoj kaj en pluraj lingvoj. Anka? en Esperanto.

Kiel  ?iujare Kuba Esperanto-Asocio partoprenas tiun ?i eventon, kiu allogas plurmilojn da vizitantoj kaj libroamantojn ?enerale. Esperantistoj de?oras kaj montras esperantoverkojn kun la celo informi pri la lingvo kaj allogi interesitojn.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/313473-librofoiro-internacia-de-havano-2023-estas-spaco-ankau-por-esperanto-lingvo

**Radio Habana Cuba**